

Bonvenon al la disko Karnavaletto de Olivier Tzaut.
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 1981 decembro 17 kaj 19.

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-1981-85/SRI-1981-85-2-541-Claude-kaj-Andree-GACOND-Bonvenon-al-la-disko-Karnavaletto-de-Olivier-Tzaut.mp3>

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Ĉi aŭtune Olivier Tzaut produktis duan diskon sub la titolo : ‘Karnavaletto’. Jen, vi aŭskultu tiun kanzonon, Karnavaletto, kiu enkondukas la kanzonfeston, al kiu Olivier Tzaut vin invitas per sia nova disko. Vi sciu, ke tiu ĉi kanzono estis verkita kaj muzikigita de Claude Piron.

(muziko)

A.- Unika fenomeno en esperantujo, la unua disko de Olivier Tzaut, kiu titolis ‘Tra l’ mondo’ sufiĉe rapide disvendiĝis, kio fakte ne nur kuraĝigis la kantiston ĝin tuj re-eldoni, sed samtempe naski fraton al ĝi. La disko ‘Karnavaletto’ nur povos firmigi la famon de Olivier Tzaut, ĉar denove la kvalito mem de la elektitaj kanzonoj estas senriproĉa. Kaj la interpretado respektplena por la lingva ritmo mem de esperanto, samkvalita al tiu de ‘Tra l’ mondo’.

Cl.- En tiu disko troviĝas dua originalaĵo. Temas pri socikritika kanto, ankaŭ verkita kaj muzikigita de Claude Piron. Kiel vi aŭdos, ĝi opoziciigas la mizeran vivon de nigrulo sudafrika, kies sorto estas suferi en diamantminejo, al la senzorga luksemo de diamantportanta elegantulino. Konkludiĝas la kanto per la vortludoj, ‘ne diamanto’, ne ‘di’ -amanto’, sed ‘diabl-amanto’.

A.- Olivier Tzaut lerte interpretas tiun kanzonon de Claude Piron. Aŭdu !

(muziko)

Cl.- La tradukaĵoj de Claude Piron, Reymond Schwarz, Roger Bernard kaj Giorgio Silber, kiujn Olivier Tzaut interpretas en sia nova disko ‘La Karnavaletto’ ankaŭ indas je atento. La venontan semajnon ni aŭdigos al vi kelkajn el ili.

A.- Povu tiu ĉi elsendo kaj la venontsemajna instigi vin eble donaci la diskon ‘Karnavaletto’ al viaj gekonatuloj, eĉ se ili ne komprenas esperanton. Per ‘Karnavaletto’ ili almenaŭ komprenos, ke la zamenhofa lingvo estas bela esprimilo.

Cl.- Claude kaj Andrée Gacond ekprezentis al vi la novan diskon ‘Karnavaletto’ de Olivier Tzaut. Ĝis reaŭdo!